



# aktuala

## 34-a ELDONJARO

**Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj : ... <http://users.belgacom.net/EBG> ; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be) ; [xurb.freehostia.com](http://xurb.freehostia.com) ; [esperanto.net](http://esperanto.net) ; [esperanto.be](http://esperanto.be) ; [lernu.net](http://lernu.net) ; [uea.org](http://uea.org) ; [liberafolio.org](http://liberafolio.org) ; [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net) ; [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala) ; [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri Domo Stoclet
- Paĝo 3 - Zamenhof-festo de EBG sabate 12/12 en kutima Zeyp-centro
- Paĝo 4 - Kotiz-Tabelo 2010; Esperantaj Eventoj
- Paĝo 7 - Poemaro de Garcia Orive, Gongora, Moĵave
- Paĝo 8 - Anna Löwenstein pri La Nova Modo: -ujo
- Paĝo 10 - Astronomio; Morbecque; Voluntulo TEJO; Medvedev
- Paĝo 11 - Karavano al Mongolio ; Elstaraj Esperantistoj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Oktobro 2009

- 7 Semajna kunveno (+ daŭre kurso 1 kun 14 lernantoj + kurso 2 kun 8 lernantoj)
- 14 Semajna kunveno
- 21 Prokrastita "sine die" denove dua prelego de Seán Oriain pri "Toastmasters"
- 28 Bernard-Regis Larue prelegas pri Sennombraj Asteroidoj

### Novembro 2009

- 4 Hélène Falk-Bracke prelegas pri "Kubo ek de jaro 1450 ĝis nun"
- 11 Semajna kunveno
- 18 Semajna kunveno
- 25 Bernard-Regis Larue prelegas pri Jupitero la Giganta

*Bernard-Regis Larue pri Saturno Majstro de la Ringoj, la 20a de Januaro*  
Grupanoj aŭ ne, prelegantoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

## DOMO STOCLET

Unuaranga kultura evento okazis en Bruselo fine de Junio 2009. Unesko enskribis la domon Stoclet en la Komunan Heredaĵon de la Homaro. La domo Stoclet situas 281, avenuo Tervuren en Woluwe St Pierre. Se, venante de la centro de Bruselo, vi veturas sub la arkadoj de la Kvindekjara Jubelparko, post la parko komenciĝas la avenuo Tervuren. Je la dekstra flanko, vi vidos la **domon Stoclet** tuj post la "square Leopoldo dua". Nune, kelkaj nomas ĝin "la palaco Stoclet". Temas pri luksa familia bieno el blanka marmoro kun rektangulaj fenestroj enkadritaj de bronzoritaj modluroj. Kvadrata turo elstaras de unu angulo. Sur Google-Internet, vi trovos multajn artikolojn pri tiu domo en pluraj lingvoj, eĉ japana. Vi trovos ankaŭ bildojn. Ĝi estas la sola domo de tiu stilo en Bruselo. Ĝi estas la ĉefverko de la Viena arta skolo "**Die Secession**". Samnome estas en Vieno, domo kun ora kupolo de laŭro-foliojn, kiu estas loko por ekspozicioj. En ĝi estas ĉiam videbla "la Beethoven-frizo", sinsekvo de pentraĵoj de **Gustav Klimt**, kiuj ilustras la vortojn de "Ĝojo, bela dia lumo...tiu kiso de la tuta mondo" estas fama. Alia versio samtempe estas en la domo Stoclet, kies arkitekto estas la viena **Joseph Hoffman** (1870-1956). Ĝi estis konstruita inter 1905 kaj 1911. La enan dekoracion faris la pentristo **Gustav Klimt**, la estro de la Viena skolo "**Jugend Stil**" Juneco-Stilo, tradukita francan per "**Art Nouveau**". La posedantoj : **Adolphe** kaj **Suzanne Stoclet** loĝis tiutempe en Vieno. Li estris bankon (se mi bone memoras)

kaj kontraŭ la volo de lia patro, li edziĝis en 1894 kun **Suzanne Stevens** kies patro, amiko de la reĝo Leopoldo dua, vendis pentraĵojn, kaj kies onklo estis la fama pentristo **Alfred Stevens**. Suzanne kreskis en artista medio kaj la Viena artskolo kaj etoso estis al ŝi kvazaŭ paradizo. Tie, la paro amikiĝis kun la artistoj kaj mendis la domon konstruotan en Bruselo. Jugendstil estas globala arto. La ĝardeno, kaj ĉiuj detaloj de la domo devas kongrui pri stilo, koloroj el la sama enspiro. Pordoj, klinkoj, mebloj, tapiŝoj, pentraĵoj, k.t.p. Tiun postulon, vi retrovas en la belga Jugendstil. En Bruselo, eblas viziti multajn realigajoj de **Victor Horta**. La medaliono **SAS** (Stoclet-Adolphe-Suzanne) artisme interplektita, estas fakte la familia asocio, kiu enhavas la liston de la heredantoj kaj la reguloj pri la heredo. La aktualaj heredantoj estas kvar, al kiuj oni riproĉas ke ili ne bone prizorgas la domon. Tio povus klarigi kial **Charles Piqué**, regiona brusela ministro pri komuna heredaĵo estas la iniciatoro de la sekva demarŝo: enskribi la tuton, domon, meblojn, ĝardenon en la homara heredaĵo. La heredantoj jam komencis proceson kontraŭ tiun decidon, ĉar ili volas vendi la bienon en diversaj lotoj. Ankaŭ la belgaj tri federalaj regionoj avidas pri la bieno. Pro tio eble vi multe aŭdos pri la domo Stoclet venontvintre. La brusela regiono jam nun elspezas monon por ke la domo ne disfalu tute. Ĝi esperas helpo de la Aŭstria Ŝtato por antaŭgardi la plej kompletan specimenon de la Viena arta skolo nomata Secesio.

## ZAMENHOF-FESTO : VIVU KUBO

La Esperantista Brusela Grupo kun grandega plezuro invitas vin.



Sabaton la 12an de decembro 2009, 11h30-18h, en la kultura centro de Zeyp, 47, Zeypstrato, 1083 Bruselo. Por elvoki Kubon, ni ŝatus ke vi aldonu ion tiurilatan al viaj vestaĵoj aŭ ke vi vestu vin per blua, blanka kaj ruĝa koloroj. Dum la distra programo, ni surprizigos vin interalie per televid-programo pri Kubo, skeĉoj de la klubanoj kaj ne-atendita renkontiĝo. Ni ankaŭ bonvenigos italan aktoron: Mario Migliucci. Li prezentos sian teatraĵon "Dr. Zamenhof" ĉifoje en Bruselo, post fari same, inter alie, en Roterdamo, Bialistoko, Malborko. La libro-servo de FEL tenos standon ĉe la festo!

Aliĝprezo : nur distra programo, (posttagmeze) : 5 €

Aperitivo, malvarma bufedo, distra programo: 15 € (20 € post la 25a/11)

Pagenda ĝis la 6a de decembro al la konto 000-0123048-52 de EBG.

Se vi posedas lotojn, bonvolu kunporti ilin por la tombolo. Ni atendas vin, multnombrajn kaj entuziasmajn.

**GRAVE : ni nepre devas scii sufiĉe frue kiu partoprenos la manĝon por la plej bona organizo de la festo. Enskribu vin tuj!**

Tel 02/358.27.28 [patrick.pellegrin@skynet.be](mailto:patrick.pellegrin@skynet.be)

Kiel atingi la kulturen centron: Vi vidu apudsuban mapon.

Aŭto : granda parkejo: Zeypstrato

Metro: ĝis stacio Simonis; de tie per buso 87, kiu laŭiras la av.van Overbeke; elbusiĝu je la halto Nereus.



## KOTIZ-TABELO 2010

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
<b>ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO</b>				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+ partopreno en la vivo de la Grupo
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	Partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo ( 25 X MEM kotizo )
<b>BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIJ</b>				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
<b>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO</b>				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	24	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	60	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	120	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1500	MA de UEA dum la tuta vivo! ( 25 X MA kotizo )

Kara abonanto, por ke vi ne ĉesu ricevi Aktualan, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2010 al kasisto

## ESPERANTAJ EVENTOJ



Nova estraro de EBG elektita dum Ĝenerala Jarkunveno de la 14a de Oktobro





Nova kern-estraro komponata de Jan Amadori kasisto, Muriel Petit sekretario, Angelos Tsimokos prezidanto



17a E-semajno de Kulturo kaj Turismo en Pineda de Mar, Katalunio, 3-10 oktobro



Esperantujo ĉe Marlène kaj Arie Bouman en Portiragnes-plage, Languedoc, 1-13 oktobro



5a Mozellanda E-semajfino en Marienburgo, Rheinland-Pfalz, 25-27 septembro



La Hirundo, Skolta Esperanta Ligo, de Tienen, ekskursis al Chimay, Boto de Hegenovio, sabate 19 septembro



44a Brazila Kongreso, urbo Juiz de Fora, 12-17 Julio 2009



SENTANTE VIAN FORESTON

Kiam naskiĝas ĉi tiu poemo,  
mortiĝas la tago en la silenta  
ombro, de la nokto indiferenta  
al l'plenumiĝita stelara tremo.

Ĉi soneto en l'agonia ĝemo  
vivas, pro senti, ke estas momenta  
la amfeliĉo, kiu, kiel venta  
blovado, foriras el mia memo.

Mi sentas l'estaĵon de la nenio  
pro via foresto. Kiel rivero  
estas la fluanta melankolio,

kiu kuntrenas min al malespero.  
Tamen alvenas nova iluzio  
kun via ĉeesto kaj amo-vero.

Soneto de Alberto Garcia Orive, Bilbao, Eŭskio, Hispanujo

VERSAĴO ASONANCA

Plej bela knabino  
El mi vilaĝ',  
Hodiaŭ edzino  
De nur unu tag',  
Vidante marŝantan  
Lin al batalad',  
Al patrino diras  
Larmante sen halt',  
Ho lasu min plori  
Ĉe bordo de l' mar'.

Ĉar, panjo, vi dotis  
Min en frua aĝ'  
Per plezur' mallonga  
Kaj longa penad',  
Kaj vi min fordonis  
Al edzo, for jam,  
Havanta ŝlosilojn  
De mia malkapt',  
Ho lasu min plori  
Ĉe bordo de l' mar'.

La dolĉokupado  
Pri ama rigard'  
Nun, okuloj miaj,  
Fariĝu plorad';  
Vi, do, ne pli taŭge

Vin okupus, ĉar  
Foriris militon  
Jen li, mia pac'.  
Ho lasu min plori  
Ĉe bordo de l' mar'.

Ne min detenigu,  
Nek kulpigu ja,  
Pri tio - justeco,  
Pri ĉi tio - prav',  
Se tre vi min amas,  
Ne venu kun bat',  
Estas pli malbona  
Mort' en sitentad'.  
Ho lasu min plori  
Ĉe bordo de l' mar'

Kara panjo, kiu  
Povus sen plorad'  
Vidi miajn verdajn  
Jarojn de junaĝ'  
Tute velkiĝantajn,  
Kaj sen plendo ajn  
Restus, ne havante  
Koron por kompat'?  
Ho lasu min plori  
Ĉe bordo de l' mar'

Foriru la noktoj,  
Ĉar foriris jam  
Kiu maldormigis  
Min per la rigard'.  
For, noktoj, ne vidu  
Solecon en ĉambr',  
Dum en lit' malmankas  
La duona part'.  
Ho lasu min plori  
Ĉe bordo de l' mar'

Luis de Gongora 1562 - 1627  
Elhispanigis Vincente Inglada, Valencio, Hispanujo

AŬRORA SILENTO

Tagon englutis la nokt' magia,  
Ŝveba trankvilo ekregis min;  
Pano, fromaĝo kaj ruĝa vin',  
Kia silento, beato kia!

Paŭlo Paŝa Mevo Pavel Mojaev,  
Jalto, Simferopolo, Krimeo, nokte 2-3.07.2002

LA NOVA MODO: -UJO

Kial mi insiste pludiras *Germanujo*  
kaj *Italujo*, kiam ĉiuj aliaj preferas  
*Germanio* kaj *Italio*? Nu, pro pluraj  
kialoj. Parte ĉar -io ŝajnas al mi  
stranga finaĵo, ne kongrua kun la  
simpleco kaj reguleco de Esperanto.  
Pli pri tio poste. Sed plejparte ĉar mi  
ne eltenas la konfuzon, kiun la finaĵo -  
io alportis al la landonoma sistemo en  
Esperanto.

Kia konfuzo? Hmm, kiel klarigi la  
landonoman sistemon en unu alineo?  
Mi jam dediĉis al tiu temo tutan  
libreton. Sed mi faros mian eblon  
klarigi rapide.

La landonomoj en Esperanto estas  
dividitaj en du grupoj. Unu grupo  
sekvas la modelon *Usono*, *usonano*, la  
alia sekvas la modelon *Britujo*, *brito*.  
Multaj esperantistoj, kompreneble,  
preferas uzi -io anstataŭ -ujo, kaj do  
diras *Britio*. La problemo estas, ke  
ankaŭ en la unua grupo (*Usono*,  
*usonano*), multaj landonomoj finiĝas  
per -io, ekzemple *Alĝerio*, *Aŭstralio*,  
*Namibio*, *Kolombio*. Do, kiam oni  
renkontas landonomon, kiu finiĝas  
per -io, kiel scii, ĉu ĝi sekvas la  
modelon *Usono*, *usonano*, ĉu la  
modelon *Britio*, *brito*? Tio gravas,  
kiam necesas formi la nomon de la  
landano, ĉar en la unua kazo necesas  
aldoni -ano al la radiko, dum en la dua  
necesas forigi la -i-.

Kiam la plejmulto da esperantistoj  
uzis la finaĵon -ujo por landonomoj de  
la dua grupo, ne estis problemo. Ĉiuj  
esperantistoj (eĉ tiuj, kiuj preferis -io)  
sciis, al kiu el la du grupoj landonomo  
apartenas, kaj do senprobleme sciis  
formi la nomon de la landano. Sed  
nun, bedaŭrinde, kiam preskaŭ ĉiuj  
uzas -io, la distingo inter tiuj du

grupoj perdiĝis, tiel ke multaj  
esperantistoj ne plu komprenas kiel la  
sistemo funkcias; efektive iuj ne plu  
komprenas, ke entute ekzistas du-  
parta sistemo. Rezulte, oni tre ofte  
renkontas erarajn formojn, ekzemple  
*aŭstralo* aŭ *Israelio*. (Se vi ne  
komprenas, kial tiuj estas eraraj,  
bonvolu legi la pli detalan klarigon en  
mia libreto *Konciza klarigo pri la  
landonomoj en Esperanto*.)

Sed krome, la finaĵo -io kunportas  
plurajn aliajn problemojn. Ĉu la -i-  
estas sufikso? Ĝi ne similas la aliajn  
sufiksojn en Esperanto, kiuj normale  
havas la formon V+K (vokalo plus  
konsonanto) aŭ V+KK. Krome, ĝi  
kondukas iom malsame: malkiel la  
aliaj sufiksoj oni ne povas uzi ĝin  
memstare.

La vortelementoj en Esperanto  
normale estas kunmetitaj laŭ  
travidebla maniero. Ni ĉiam emfazas  
tiun fakton en nia reklamado: kiam ni  
volas konvinki la homojn lerni  
Esperanton, ni donas ekzemplojn kiel  
*mal-jun-ul-in-o* aŭ *nask-iĝ-tag-o*. Tiuj  
kunmetaĵoj estas facile analizeblaj kaj  
ĉiu elemento havas sence. Sed kion  
diri pri la -i- en *Francio*? Certe ne  
ekzemplo, kiun ni povus uzi en nia  
reklamado!

Mi foje aŭdas la kritikon, ke la  
sufikso -uj- havas tro da signifoj en  
Esperanto. Nu, ĝi ja havas tri  
malsamajn signifojn – kaj tamen,  
multe malpli ol -io, kiu kondukas vere  
ĥameleone en Esperanto. -io foje estas  
uzata:

- por la nomo de scienco,  
ekzemple *astronomio* aŭ *biologio*,  
kontraste kun la nomo de la sciencisto  
*astronomo* aŭ *biologo*;

- por la nomo de hemia elemento,  
ekzemple *ejnŝtejnio*, *mendelevio*

surbaze de la personaj nomoj *Ejnŝtejno*, *Mendelevo*;

- por la nomo de regosistemo, ekzemple *demokratio* aŭ *monarĥio*, kontraste kun la vortoj *demokrato* kaj *monarĥo*;

- por diversaj aliaj ismoj kaj ecoj, ekzemple *stenografio*, *pederastio* kontraste kun la vortoj *stenografo* kaj *pederasto*;

- kiel unu el la korelativoj;

- (sen la fina -o) kiel infinitiva finaĵo de la verbo.

Mi scias, ke multaj esperantistoj ne ŝatas -ujo pro ĝia baza signifo kiel entenujo. Kaj do? Ĉu persona ŝato aŭ malŝato rilate al iu elemento en Esperanto donas la rajton modifi la lingvon – precipe kiam tiu modifo detruas la logikon de unu el ĝiaj sistemoj? Cetere, mi mem uzas -ujo multe pli ofte en landonomoj ol en vortoj kiaj *laktujo*, *sukerujo* ktp., do mi por mi tio estas ĝia ĉefa signifo.

Aliaj esperantistoj kontraŭstaras la finaĵon -ujo pro etnismaj kialoj. Ili argumentas, ekzemple, ke ilia lando ne nomiĝu *Hispanujo*, ĉar tie loĝas ne nur hispanoj, sed ankaŭ katalunoj, eŭskoj kaj aliaj. Laŭ ili, tiu problemo malaperas, se la lando nomiĝas *Hispanio*. Ĉu vere? Al mi tio ŝajnas nura ĵonglado per vortoj, pli precize per sufiksoj: provo solvi politikan problemon per manipulado de la lingvo. Farante tion, oni neniel ŝanĝas la situacion de la katalunoj kaj eŭskoj, sed oni ja terure fuŝas la regulecon de Esperanto.

Per la uzo de -i- oni forglitas de la facila analizebleco, kiu estas ĉefa trajto de Esperanto, al nedisigebla simila al tiu, kiu regas en la nature evoluintaj lingvoj. Certe, iuj neregulaĵoj jam ekzistas en Esperanto:

pensu pri la serioj *redakti*, *redaktoro*, *redakcio*, kaj *poeto*, *poemo*, *poezio*. Tiuj tri-vortaj serioj evidente havas komunan fonton, sed la elementoj ne povas esti disigitaj; efektive la lasta konsonanto de la radiko eĉ estas modifita. Tiuj ekzemploj, bonŝance, rilatas nur al unuopaj vortoj, kaj do ne havas sekvojn por la baza funkciado de Esperanto. La situacio estas multe pli serioza, kiam tia neanalizebleco trafas tutan sistemon, t.e. la sistemon formi la landonomojn.

Mi rimarkas kun plezuro, ke -ujo komencas iometete reaperi. Interalie, unu el la estraranoj de UEA lastatempe ekuzis ĝin, konvinkite de la argumentoj en la libro *Rusoj loĝas en Rusujo*. Multaj esperantistoj efektive komprenas, ke -ujo estas pli logika ol -io, sed ili hezitas mem uzi ĝin, ĉar ili trovas ĝin “eksmoda”. Nu, modoj povas ŝanĝiĝi, ĉu ne?

Se vi opinias, ke -ujo estas pli bona ol -io, kuraĝu ekuzi ĝin! Estu en la fronto de la nova modo!

Por pli da informoj pri la finaĵo -ujo, vidu:

- *Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto*. Corsetti, Gubbins, Wennergren, de Kock, Vaha, Butler, Camacho k.a. Federazione Esperantista Italiana, Milano, 2007. Prezo: €10.50 ĉe la libroservo de UEA. La libro estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla ĉe: [http://www.bonalingvo.it/index.php/Rusoj\\_loĝas\\_en\\_Rusujo\\_L\\_andnomoj\\_en\\_Esperanto](http://www.bonalingvo.it/index.php/Rusoj_loĝas_en_Rusujo_L_andnomoj_en_Esperanto).

- *Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto: kun kompleta listo de landoj kaj landanoj*. Anna Löwenstein. Palestrina, 2009. Prezo: €0,90 ĉe la libroservo de UEA.

La libro estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla ĉe: <http://www.bonalingvo.it/docs/klarigoprilandonomoj.pdf>.

- *La landonomoj – pli simplaj ol vi supozas!* 37-minuta parolado de Anna Löwenstein spektebla ĉe: <http://www.ipernity.com/doc/29075/5145769> kaj ĉe: <http://www.vimeo.com/5030540>.

Anna Löwenstein, akademiano, Italujo

## PRELEGOJ PRI ASTRONOMIO

Bernard-Regis Larue, dumviva membro de EBG, astronomo amatora, sekvas kursojn de la Astronoma Observejo de Parizo, kio ebligas al li atingi universitatan diplomon. Li daŭros liajn merkredajn po-monatajn prelegojn en EBG, pri temoj laŭvice:

- Sennombraj asteroidoj.

- Jupitero, la giganta.

- Saturno, majstro de la ringoj.

- La plej diversaj lunoj de Saturno.

- Kial Plutono ne plu estas planedo?

- Sur la vosto de kometoj.

La venontaj prelegoj okazos 28/10, 25/11, 20/01. La sekvantaj datoj estos oportune anoncataj.

## SEMAJNFINO EN MORBECQUE

La Nordfrancia Esperanto-Federacio invitas vin al la 21a Eŭropa Rendevuo de Morbecque, Sabate kaj Dimanĉe, la 14a kaj 15a de Novembro en Morbecque-le-Parc. La staĝo estas organizata de France kaj Richard Valet. Pro la proksimeco multe da belgoj kaj belganoj kutimas partopreni. Informiĝu pri detaloj ĉe: [www.esperanto-nord.org](http://www.esperanto-nord.org)

## NOVA VOLONTULO TEJO

Saluton, mi estas Aleks. Hodiaŭ, la 14an de septembro, mi komencis mian laboron kiel volontulo TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, en la Roterdama Centra Oficejo de UEA. Ĝis la fino de la semajno, kiam estos la Estrarkunveno, Paŭlo, la antaŭa volontulo, ankoraŭ restos por klarigi ĉion. Jen eta memprezento. Mi naskiĝis la 27an de septembro 1980 kiel Alexandre Baudry kaj estas franca esperantisto, kiu loĝis ĝis antaŭ du tagoj en Cholet (Francio). Mi studis ekonomion ĉe la

universitatoj de Nantes kaj Rennes (Francio). Mi unue laboris en Nantes pri agrikultura ekonomio ĉe INRA (Nacia Instituto pri Agronomia Esplorado), kaj poste laboris dum kvar jaroj ĉe la Katolika Universitato de Loveno en Louvain-la-Neuve, ankaŭ pri agrikultura ekonomio. Mi esperantiĝis je la fino de 2007 kaj ekde tiam partoprenis la vivon de la loka klubo de Louvain-la-Neuve. Mi estas nun membro de la estraro de Junulara Esperantista Franca Organizo - JEFO.



Alexandre Baudry, 2009/09/14

## MEDVEDEV “NE” AL ESPERANTO

Se Rusio oficiale ekuzas Esperanton en internaciaj rilatoj, tio signifus libervolan fordonon de unu el la atributoj de nacia suvereneco, la propra lingvo. Tiel argumentas

kontraŭ Esperanto la oficejo de la rusia prezidento Dmitrij Medvedev, responde al letero de Rusia Esperanto-Unio. En sia letero la esperantistoj esprimis sian zorgon pri la kreskanta potenco de la angla lingvo kaj pri la malhelpoj, kiujn renkontas instruado de Esperanto en rusiaj altlernejoj. La prezidenta letero respondas al komplete aliaj demandoj ol tiuj starigitaj de REU, ŝajnigante ke esperantistoj volas ĉesigi la uzon de la rusa lingvo en internaciaj rilatoj.

### KARAVANO AL MONGOLIO

Se vi ŝatas sperti ion novan kaj interesan, agrable pasigi tempon en E-komunumo, do aliĝu al formiĝanta grupo de vojaĝantoj al Mongolio. Junie 2010 estos efektiviĝinta E-karavano tra Rusio survoje al la 6a Azia E-Kongreso en Ulanbatoro. Partoprenantojn de la karavano atendas konatiĝo kun vidindaĵoj de S-Peterburgo kaj Moskvo, Irkutsk kaj Bajkal-lago, vizito al spektakloj de rusa baletoj kaj cirko. Alloga pertrajna vojaĝo tra eŭropa kaj azia partoj de la lando permesos ekkoni vastaĵojn de Rusio, kaj eble efektiviĝi vian delongan revon – veturi longdistance (pli ol 5000 km) laŭ unika fervojo, kiu aspektas kvazaŭ parto de "surtera ponto", kiu komenciĝas ĉe bordoj de Pacifiko kaj finiĝas ĉe Atlantiko.

Pliajn informojn vi povas ricevi en [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu) (internacia kalendaro de E-aranĝoj, junio 2010) kaj en [www.mongolio.info](http://www.mongolio.info) en la rubriko Azia kongreso, E-karavano tra Rusio. La vojaĝon organizas Tatjana Loskutova, UEA-delegito en Ivanovo, Rusio ([lota49@mail.ru](mailto:lota49@mail.ru))

Tatjana Loskutova

## ELSTARAJ ESPERANTISTOJ

11

### Gaston Waringhien

Gaston Waringhien (Gastono Varingjano) naskiĝis la 20-an de julio 1901 en Lille, Francio kaj mortis la 20-an de decembro 1991 en sia hejmo en Parizo. Li estis franco, profesoro kaj grava vortaristo kaj gramatikisto de Esperanto. Li aperigis verkojn sub la pseŭdonomoj Georges E. Maŭra, A. Nurak kaj A. Papadiamantopoulos. En Nova Plena Vortaro (NPIV) de 2002, lia nomo aperas ankaŭ sub la esperantigo Varingjano.

Waringhien gvidis kursojn pri Esperanto, verkis kaj tradukis. Li estis prezidanto de la Akademio de Esperanto de 1963 ĝis 1979. Li estis kunredaktoro de «Literatura Mondo» kaj ĉefredaktoro de «La Nica Literatura Revuo». Li multe tradukis poezion, ĉefe el la franca, sed ankaŭ el la angla kaj la germana, kaj kontribuis al la "Angla Antologio". Li estis vortaristo kaj inter la projektoj kiujn li prilaboris estas la «Plena Vortaro» (1930-a kaj postaj eldonoj), la «Plena Ilustrita Vortaro» (1970), kaj la «Granda Vortaro Esperanta-Franca» (1957).

### Francisko Haiderer

Francisko Haiderer estis esperantisto partopreninta la Hispanian Enlandan Militon aliĝante al la Internaciaj Brigadoj. Li regule kunlaboris kun la revuo «Popola Fronto», kiu tre utilis al la respublikanoj kiel internacia informilo. Li laboris en la esperantista informejo starigita de Julio Mangada kaj Ludoviko Renn, flegante kontakton kun la FET (Fédération Espérantiste du Travail) pere de Marcelle Robineau. Post malvenko de la Respubliko, li estis malliberigita -

12

same kiel aliaj internaci-brigadistoj - unue en koncentrejo de St-Cyprien, kaj poste en tiu de Gurs. Tie, li kunfondis Esperanto-grupon kun 49 homoj el diversaj landoj. Tiu grupo aranĝis en la kontentrejo de Gurs kvar E-kursojn. La FET daŭre subtenis ilin sendante lernmaterialon (kraĵojn, paperon, ktp), poŝtmarkojn pro ke la malliberuloj povu korespondi kun siaj familianoj, nutraĵojn kaj ankaŭ revuojn «Sennaciulo» kaj «Sennacieca Revuo» (kiuj tiam havis sintenon ege malfavora kaj misfamiga al la «Internaciuloj»). Francisko Haiderer sendis do al SAT protestan leteron, kiu estis publikigita en «Internaciisto». Li ankaŭ kontribuis al granda projekto kunverki kolektivan libron pri la Hispania Enlanda Milito, kiun redaktis kaj transdonis al presejo Claude Bourguignon (Boubou). Komence de la Dua Mondmilito, Francisko Haiderer kaj aliaj «Internaciuloj» estis translokigitaj al la kastela karcero Mont-Louis. «De tie la Petain-registaro de Vichy transdonis (ilin) al la germana Gestapo kiu transportis (ilin) al koncentrejo de Dachau, kie (ili) restis ĝis fino de la milito», skribis Haiderer en unu letero.

### Rajmundo Laval

Rajmundo Laval (naskiĝis en 1900 en Aleso kaj mortis la 18-an de marto 1996) estas konata pseŭdonome kiel Valo.

Esperantisto ekde 1912, li estis ano de la kabareda rondo de Raymond Schwartz, kies verkojn kaj revuon «La Pirato» li ilustris. Li funkciis kiel kasisto de la Pariz-Regiona Federacio de la landa asocio SFPE en la 20-aj jaroj, fondis grupon en Joinville-Champigny (1923) kaj kunfondis E-

grupon en Pau (1946). En 1934 li aliĝis al Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj korespondis kun Lanti. Post emeritiĝo, li dediĉis sin al tradukado kaj verkado: sekretario de la Literatura Komitato de SAT ekde 1961, kunrevizianto de la lernolibro «Cours Rationnel» (1973), li aperigis ekde 1975 ĉe la Broŝurservo de SAT 22 titolojn, i.a. verkojn de Lamarck, Paskalo, Han Riner, Kropotkin (kuntraduko), «La poemo de Rodano» de Frederic Mistral (el la provenca), aŭtobiografion en kvar volumetoj kaj, laste, kolekton da studoj kaj artikoloj, «Vortoj de Valo» (1995). Ĉi tiun eniris i.a. liaj kontribuoj al la revuo «Laŭte!», en kiu li havis konstantan rubrikon, «Vortoj de maljunulo», de 1982 ĝis sia lasta vivmonato.

### Ludwig Renn

Ludwig Renn (Ludoviko Ren) parolis Esperanton. Kune kun Eŭgeno Miĥalski, li iniciatis en 1931 Internacian Asocion de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV), sekcio de Internacia Unio de Revoluciaj Verkistoj. Li naskiĝis en Dresdono la 22-an de aprilo 1889 kaj mortis en Berlino la 21-an de julio 1979. Li estis germana verkisto kaj internaci-brigadisto dum Hispania Enlanda Milito. Renn estis filo de nobela familio. Lia oficiala nomo estis Arnold Friedrich Vieth von Golssenau. Unue li fariĝis oficiro, sed post la Unua mondmilito li forlasus tiun ĉi karieron (li estis rifuzinta pafi al strikantaj laboristoj) kaj studis juron, ekonomikon, arthistorion, rusan filologion kaj arkeologion. En la jaro 1928 aperis lia romano «Krieg» (= Milito), temanta pri la milito kaj travivaĵoj de la soldato Ludwig Renn (inspirita el liaj propraj travivaĵoj). La



nomo de la protagonisto fine fariĝis la pseŭdonomo de la aŭtoro.

### **Politika engaĝigo:**

Li poste publikigis duan romanon, «Nachkreig» pri la spartakista ribelo de 1930. Persekutita de la nazia reĝimo pro sia politika sinteno (sub akuzo de "literatura granda perfido"), Renn pasigis de 1932 ĝis 1935 en malliberejo. En la jaro 1936 li elmigris trans Svislando al Hispanio. Tie li partoprenis la Enlandan Militon, interalie kiel stabestro de Internacia Brigado. En 1937, li turneis en Usono por kolekti monon subtene al la respublikana armeo de Hispanio. Post venko de Franko en Hispanio, li estis malliberigita de la franca registaro ĝis 1940, kiam li povis translokiĝi al Meksiko. Tie li daŭre aktive agadis en politiko. Li ankaŭ multe verkis pri siaj travivaĵoj dum la Hispania Enlanda Milito. Post disfalo de la nazia reĝimo, li revenis al Dresdono en 1947 kaj fariĝis profesoro pri antropologio. Ekde 1952 li vivis kiel verkisto en Orienta Berlino, kie li en 1979 mortis.

### **Andreu Nin**

Andreu Nin i Pérez, laŭ sia tuta nomo, naskiĝis la 4-an de februaro 1892 en El Vendrell, provinco de Taragono, Hispanio, kaj murдите mortis la 22-an de junio 1937 en Alcalá de Henares, Madrido, Hispanio. Li estis unu el plej gravaj figuroj de la respublikanismo en Hispanio.

### **Andreu Nin, esperantista:**

Andreu Nin estas socidevene tre modesta (li estis filo de ŝuisto kaj kamparanino). Li komencis sian agadon lernante la tutmondan lingvon Esperanton ekde 1907 en El Vendrell, kune kun sia amiko Amadeu Martorell. Li ankaŭ organizis kursojn

13

en loka lernejo, verkis artikolojn pri Esperanto por la loka gazetaro kaj partoprenis la fondon de esperantista grupo Frateco, en aprilo 1909. Li malmultan tempon antaŭ la Unua Mondmilito translokiĝis al Barcelono, kie li ankoraŭ iom aktivis kiel membro de la esperantista grupo Barcelona Stelo, kaj laboris kiel instruisto en liberecana kaj laika lernejo sed rapide li sin dediĉis tute al politiko kaj ĵurnalismo.

### **Politika agado:**

La jaro 1917 estis decidiga en sia vivo. Eventoj, kiel la ĝenerala striko de aŭgusto, la Revolucio en Rusio kaj la batalado en Barcelono inter mastraro kaj sindikatoj - ĉefe la CNT (Nacia Konfederacio de la Laboro) - lin tiel profunde influis, ke li unue aniĝis en la Partio Socialista Laborista Hispania (PSOE) kaj poste adoptis la revoluci-sindikatan lukton aliĝante al CNT. Partopreninte la duan CNT-kongreson en 1919, en kiu li advokatis aniĝon de CNT en la Komunistan Internacion, li anstataŭis murditan Evelio Boal, kiel sekretario de la Tutlanda Komitato de CNT.

Dum tutlanda asembleo de CNT okazinta en aprilo 1921, Nin elektiĝis delegito por partopreni la trian kongreson de la Komunistan Internacion kaj la fandan kongreson de la Ruĝa Sindikata Internacio (Profintern), iĝante ĉefrolanto de ambaŭ Internacioj (en 1922, la CNT ekŝiĝis el la komunistan Internacion).

Andreu Nin loĝis dum kelka tempo en Moskvo. Ekde 1926, li aniĝis al la Maldekstra Opozicio estrita de Trocki por oponi la pligraviĝon de Stalin kaj pro tio estis devigita foriri de Sovetunio en 1930. Revene al Hispanio, Nin ĉefrolis en la fondiĝo

14

en majo 1931 Maldekstro Komunisto de Hispanio, eta grupo trockitendenca bolŝev-leninista, ligita kun Maldekstra Opozicio Internacia kaj publikiganta la periodaĵon «El Soviet». Nin estis membro de la Laborista Alianco kaj partoprenis la okazaĵojn de oktobro 1934 en Katalunio. Li distanciĝis de Trocki ĉar li rifuzis lian intencon adopti enirisman strategion en PSOE. Kiam lia grupo kunfandiĝis kun la Bloko Laborista kaj Kamparana estrita de Joaquín Maurín por fondi la Laboristan Partion pri Marksista Unuigo (hispanlingve POUM) en 1935, li estis nomumita membro de la ekzekutiva komitato de la nova partio kaj direktoro de ties organo «La Nueva Era». Li estis elektita ankaŭ ĝenerala sekretario de la Federacio Laborista de Unuiĝo Sindikata (hispanlingve FOUS) en majo 1936.

### **Hispania Enlanda Milito kaj morto:**

Kiam eksplodis la Hispania Enlanda Milito, li iĝis ĉefo de la POUM kaj post formiĝo de la Ekonomia Konsilo de Katalunio (inter aŭgusto kaj septembro 1936), li iĝis konsilanto pri justico ĉe la ĵus starigita aŭtonoma registaro de Katalunio (ĝis decembro de sama jaro), ĝis kiam ĝi estis ĉesigita pro komunistaj premoj.

Finfine, pro laŭgrada fortiĝo de kontraŭtrockiistaj streĉoj, instigitaj de sovetuniaj agentoj pere de la Komunistan Partion de Hispanio kaj Partion Socialistan Unuigitan de Katalunio (katalunia branĉo de la Komunistan Partion de Hispanio), la pozicio de la POUM iĝis, en Respublikana Hispanio, pli kaj pli neeltenebla. Post la eventoj de majo 1937 en Barcelono, Andreu Nin, kune kun aliaj ĉefoj de la POUM, kiel

Gorkin kaj José Escuder, estis arestita de la polico (16-an de junio 1937) pro malkovro, inter la konfiskitaj dokumentoj, de unu branĉo de la kvina kolono en Madrido. Inter tiuj dokumentoj, iuj «evidentigis» rilaton inter la POUM kaj la faŝisma registaro de Burgoso. La dokumentoj estis falsigitaj de la NKVD. Tuje li estis transdonita al la NKVD, kiu kaŝe agadis en la respublikana zono kun la helpo de la komunistaj policestroj kaj registaranoj. La estroj de la POUM estis translokitaj al Valensio kaj poste al Madrido. Nin estis tuj post aresto disigita de la ceteraj POUM-estroj kaj translokita ĝis Alcalá de Henares, kie li estis pridemandita kaj torturita la 18-, 19- kaj 20-ajn de junio 1937. Malgraŭ la torturoj, Nin neis ian ajn partoprenon en la faŝisma spionado. Nin probable estis mortigita la 22-an de junio, laŭ ordono de generalo Orlov, aganta laŭ ordonoj de Stalin. La loko elektita por lia ekzekuto (Alcalá de Henares) estis grava bazo de la sovetunianoj en Hispanio, kio provizis al ĉilastaj sekurec-certecon. La oficiala versio estis ke Andreu Nin estis liberigita de "siaj amikoj de la Gestapo". Tiel ĉi lin apogis Juan Negrín, estro de la Respublikan registaro. En marto 2008, oni hazarde trovis komunan tombofoson kun spurojn de kvin homaj korpoj, datiĝanmtan de la Enland-Milita tempo. Eble unu el ili estus de Andreu Nin, kio - se konfirme - enrubujigus la version de la Respublikan registaro. Ekzistas versioj indikantaj ke Negrín konis la veron pri ĉi okazaĵo kaj ĝin kaŝis per la rakonto pri la Gestapo. Kvankam Negrín, en tio kion lia nepino asertas esti liaj ontaj Memoroj, asertas ke li estis trompita.

### Charlies Billard

Charlies (Karlo) Billard estis tre aktiva membro de La Verda Stelo-Esperanto 94, Bondy Esperanto kaj pariza grupo de SAT-Amikaro. Li forpasis sabaton 28an de februaro 2009. Li kunfondis La Verdian Stelon en kiu li rolis kiel kompetenta kasisto, instruis Esperanton kaj ankaŭ

multfoje veturis al Tirnovo, Rumanio, kadre de homhelpaj agadoj, kie li sukcese instruis la internacian lingvon: unu el la lernantoj iĝis instruisto pri la franca kaj Esperanto en liceo de Timisoaro! Li partoprenis ankaŭ fondon de grupo en Bondy. Ĉion ĉi - kaj multon alian - li faris laŭ sia idealo de frateco kaj amikeco.



### GUIDO RICCI-MORELLI



Dumviva membro de Esperantista Brusela Grupo, estrarano de Skolta Esperanto Ligo, elstara juristo de Eŭropa Parlamento